

Mempropono por la FAME-kulturpremio

fame

Bernard Golden

Enkonduko

Konforme al la anonco de FAME-fondaĵo en *Esperanto* (julio-aŭgusto 1997, pĝ. 137), mi deziras proponi min kiel kandidaton por la Esperanto-Kulturpremio de Aalen.

Por pruvi ke mi meritas la premion, mi sendas ĉi-kune argumentojn kaj donitaĵojn demonstrantajn, ke dum periodo de pli ol kvaronjarcento mi kreis multenombrajn originalajn verkojn kun altnivela kultura valoro. La plej granda parto de miaj literaturaj ellaboraĵoj konsistas el verkoj temantaj pri la historio kaj aktivecoj de la tutmonda esperantistaro. La celo estas interpreti ĝiajn kulturajn manifestiĝojn ne nur por la membroj mem de la komunumo sed ankaŭ por la ne-esperantista publiko. Tial, kelkaj el miaj artikoloj kaj studaĵoj estis verkitaj en la angla lingvo kaj publikigitaj en ne-esperantistaj periodaĵoj.

Plej fruaj kontaktoj kun Esperanto

Esperanto estas firme enradikiĝinta en mia familio. Mia patrino estis esperantistino dum la fruaj jaroj de la 20-a jc. kaj persone konis doktoron Zamenhof en Varsovio, kie ŝi estis unu el la centoj da pacientoj, kiuj vizitadis lian oftalmologian kabineton. Kiel malgranda infano trafis en miajn manojn ŝia Esperanto-lernolibro, kaj kvankam mi ne povis deĉifri la rusan tekston de la broŝuro, mi tamen sukcesis legi la Esperantajn vortojn, kiuj vekis mian scivolon. Responde al miaj persistaj demandoj, mia patrino donis al mi la unuajn informojn pri la internacia lingvo de doktoro Esperanto. Tiutempe mi ne havis la bonŝancon aparteni al la tiama tre malgranda grupo de denaskuloj en Esperantujo, sed la fekunda tereno jam estis prisemita por posta esperantistiĝo. Dum la sekvaj jaroj, kiam mi de tempo al tempo foliumis tiun flaviĝintan „Unuan Libron”, pli kaj pli kreskis mia deziro iam lerni la lingvon.

Post forpaso de ankoraŭ unu jardeko mi komencis studi fremdajn lingvojn en la mezlernejo kaj universitato kaj fine, iun tagon, kiel 21-jarulo, mi komencis novan ĉapitron en mia vivo, aŭtodidakte eklernante Esperanton helpe de tre malnovaj gramatiko kaj vortaro, kvazaŭ antikvaĵoj, kiujn mi akiris en novjorka librobrokantejo. Pro mia scio de pluraj lingvoj mi trovis alproprigon de Esperanto tre facila kaj rapida.

Okaze de vizito al unu el la urbaj publikaj bibliotekoj, altiris mian atenton afiŝo pri Esperanto-grupo kaj lingvokurso en la sama lokalo. Mi ne bezonis pluan instigon, kaj la sekvan lundon mi efektive enpaŝis la unuan fojon en la Esperanto-komunumon, kie mi tuj sentis min kiel hejme. En la sekvaj jaroj mi malfermis fenestron al la eksterlanda Esperanto-mondo per interesa internacia korespondado kaj, kiam prezentiĝis al mi eblo fari eksterlandajn vojaĝojn ligitajn al mia profesia okupo, mi trovis plurajn okazojn pliprofundi miajn kontaktojn kun fremdaj kulturoj kaj popoloj, dank' al la multaj pordoj apertaj al mi, estante esperantisto.

Krom akiri multe da spertoj pri la praktika uzo de Esperanto en la ĉiutaga vivo, mi samtempe daŭrigis formalan lernadon de la lingvo kaj, volante firmigi mian statuson kiel membro de la Esperanto-komunumo, mi havigis jenajn tri diplomojn:

1. 1967: Atestilo de Kompetenteco (Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko)
2. 1970: Atesto pri Lernado (elementa) - (Franca Esperanto-Instituto)
3. 1970: Atesto pri Supera Lernado (Franca Esperanto-Instituto)

Akademia kaj profesia kariero

Mi naskiĝis en Newark, Novĵerzejo, Usono, la 23-an de novembro 1925, kaj pasigis multajn jarojn en la urbo Novjorko, kie mi frekventis lernejojn kaj universitatojn. En la Urba

Kolegio de Novjorko mi studis precipe klasikajn kaj modernajn lingvojn kaj sekvis kursojn pri arto. Oni aljuĝis al mi la bakalaŭran diplomon en 1946. Poste mi okupiĝis pri postdiplomaj studoj de pedagogio, antropologio kaj arkeologio en la samurba Universitato Columbia, diplomiĝante kiel magistro en 1953. Sekvantjare mi studis antropologion kaj arkeologion ankaŭ ĉe la Universitato de Ĉikago. Sekvis entrepreno de pluraj eksterlandaj esplorvojaĝoj kaj universitataj studoj en Meksiko, Anglio, Francio, Hispanio kaj Italio.

Inter la jaroj 1954 kaj 1975 mi laboris kiel arkeologo en la ĉi-supre menciitaj landoj kaj ankaŭ en Gŭatemalo, Svedio, Orient- kaj Okcidentafriko kaj Hungario. De 1975 ĝis mia emeritiĝo en 1985 mi oficis kiel arkeologo, muzeologo kaj bibliotekisto ĉe la Muzeo de Bakony en Veszprém, Hungario.

Aktiveco en Esperantujo

Mi estas dumviva membro de Universala Esperanto-Asocio kaj funkcias kiel fakdelegito en Veszprém pri arkeologio, esperantologio kaj interlingvistiko. En 1983 mi estis elektita membro de Akademio de Esperanto kaj aliĝis al la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro. Mi iĝis la direktoro de tiu sekcio en 1985 kaj aranĝis jenajn enketojn pri aktualaj lingvaj demandoj.

1. Elektro de la plej bona formo inter „komputero/komputoro/komputilo”
2. La semantiko de la silabo „ik”
3. Signifo kaj uzo de la sufiksoj „-ej” kaj „-uj”
4. Asimilado de *euro*, *graffiti*, kaj *Alsace/Elsass*
5. Senc- kaj uzkategorioj de vortoj por leksikografia registrado

Mi estas aŭ estis membro de la sekvaj organizaĵoj:

1. Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA)
2. Konservantaro de Internaciaj Floraj Ludoj - Florluda Majstro
3. Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvoproblemo (CED)
4. Terminologia Esperanto-Centro (TEC) - kunlaboranto
5. Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj (IUEF) - ĝenerala sekretario
6. Tutmonda Esperanta Bibliotekista Asocio (TEBA)
7. Esperantlingva Verkista Asocio (EVA) - estrarano

Nuntempe mi dediĉas min preskaŭ ekskluzive al beletra kaj faka verkado en Esperanto. Mi opinias, ke miaj kontribuadoj al la Esperanta kultura vivo, pro abundo kaj diverseco, estas unikaj, ĉar malmultaj hodiaŭaj aktivuloj povas superi ilin. La sekvaj donitaĵoj atestas tion.

Lingvo

La plej granda proporcio de miaj verkoj estas prilingvaj pritraktoj: gramatiko, semantiko, kriterioj de bona stilo kaj lingvonormoj (slango, dialekto, idiomaĵoj ks.), etimologio, esperantologio, leksikologio, leksikografio, terminologio kaj terminografio, toponimika kaj onomastika asimilado, etnolingvismoj, neologismoj, rebatado de provo proponi reformojn kun skismiga tendenco, fonetiko kaj prononcado.

En la sfero de interlingvistiko kaj planlingvistiko mi okupiĝis plejparte pri la historio kaj influo de lingvoprojektoj, precipe Volapuko, kun rilato al Esperanto. Cetere, mi faris komparajn analizojn ankaŭ de aliaj planlingvaj projektoj. Du ĉitemaj publikigaĵoj estas la sekvaj:

Bibliografiaj donitaĵoj pri eblaj planlingvaj fontoj de Esperanto. *Miscellanea Interlinguistica*. Budapest: Tankönyvkiadó; 1980

The influence of Volapük on Esperanto as indicated by lexical data. *Linguistische Berichte* (LB-Papier n-ro 61). Wiesbaden: Vieweg; 1980

Historio

La dua grava temaro de miaj artikoloj kaj studaĵoj koncernas la historion kaj nunan staton de la Esperanto-komunumo: Esperanta historiografio, biografiaj esploroj, zamenhofologio, sociologio kaj demografio de la monda esperantistaro, statistikoj pri la populacio de Esperantujo, raportoj pri la laboro de Akademio de Esperanto.

Beletro

La sekva ampleksa kategorio estas la beletro, kiu inkludas, krom la kutimaj ĝenroj de la novelo, felietono kaj teatraĵo, recenzojn, satirojn, polemikojn kaj ankaŭ lingvajn ludojn kaj kvizojn plej ofte bazitajn sur literaturaj temoj. Ankoraŭ unu okupiĝo estas la kolektado de frazeologiaj esprimoj kaj proverboj, kiujn mi klasifas laŭ temoj; mi ankaŭ kreas originalaĵojn por utiligi en miaj propraj fikciaj kaj fakaj verkoj. Tradukaĵoj en Esperanton konsistas el hungaraj noveloj kunlabore kun mia edzino Eva, kaj popolrakontoj plejparte el afrikaj kulturoj.

Ĵurnalistiko

Multaj miaj ceteraj verkoj estas klasifeblaj en la kategorio de ĵurnalistiko, ĉar ili rilatas al publicistikaj priskriboj de la aktuala Esperanto-komunumo, diskutoj pri lingvopolitiko en la nuntempo kaj estonteco, analizo de propagandaj celoj kaj metodoj, komentoj pri rilatoj inter esperantistoj kaj la ne-esperantista publiko, kaj efikoj de mondaj eventoj al okazantaĵoj ene de Esperantujo.

Eldonado kaj publikigo

Mi verkis artikolojn ankaŭ pri diversaj aspektoj de eldonado de Esperantaj publikigaĵoj, kompostadaj problemoj, recenzistiko, bibliografioj, la libromerkato en Esperantujo, redakcia politiko kaj etiko kaj la historio de publikigo de specifaj verkoj. Mi ankaŭ faris esplorojn por identigi pseŭdonimojn, plumnomojn kaj kaŝnomojn uzitajn de pluraj aŭtoroj.

Terminologio kaj terminografio

Pro la scienca kaj kulturhistoria bazo de mia edukado kaj profesia laboro, altiris mian intereson terminologiaj temoj. Mia plej grava kontribuaĵo estas kunredaktado de la Esperanta parto de *Dictionarium Museologicum*, 20-lingva glosaro de 1632 terminoj uzataj en la muzeologio kaj en parencaj fakoj. Ĝi estis eldonita en Budapeŝto en 1986 kun apogo de Internacia Konsilio de Muzeoj de UNESKO kaj Centra Direkcio de Muzeoj en Hungario.

Mi faris revizion de la terminoj proponitaj de KERNO (Komisiono de Esperanto-Redakcioj pri Neologismoj) kaj tiuj publikigitaj en *Slipara Vortaro*, *Biblioteka Terminaro*, *Terminologia Vortaro*, *Plena Pekoteko 1985-1990* kaj *Manlibro pri Politiko*. En pluraj aparte publikigitaj artikoloj kaj studaĵoj mi pritraktis leksikologiajn kaj leksikografiajn temojn kun la celo atentigi pri bezonataj senerarigo kaj kompletigo de *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV). Lastatempe mi korektis la registraĵojn pri prehistorio proponitajn por la reviziata eldono de tiu vortaro.

Pedagogio

Mi ĉiam interesiĝis pri didaktikaj kaj pedagogiaj problemoj rilate instruadon kaj lernadon de Esperanto, do pluraj miaj artikoloj pritraktas instrumetodologion, malfacilaĵojn de lernado, instruhelpilojn, mezuradon de lingvo-alproprigo per ekzamenoj, la familian uzon de Esperanto kaj denaskismon.

Alitemaj fakverkoj

Krom publikigo pri Esperantaj aferoj, mi aperigis kvindek da artikoloj kaj studaĵoj pri arkeologio, multaj baziĝantaj sur miaj propraj esploroj sur tri kontinentoj. Samnombro da verkoj tuŝas vastan gamon da kulturhistoriaj temoj ekster la kadro de la arkeologio, kaj trioble pli da verkoj ampleksas lingvistikon, fantazisciencon, Afrikon, detektfikcion, folkloron ktp.

Aperigo de verkoj

Ekde 1969 mi kontribuis al pli ol 170 periodaĵoj kaj libroj publikigitaj dise en la mondo kaj reprezentantaj plej diversajn enhavajn kaj ideologiajn vidpunktojn. Aperis en tiu tempodaŭro de pli ol kvaronjarcento preskaŭ 1900 artikoloj, eseoj, studaĵoj, recenzoj, beletraĵoj kaj tradukaĵoj el mia plumo. Inter la revuoj kaj gazetoj, en kiuj tiuj verkoj estis publikigitaj, estas la sekvaj havantaj internacian cirkuladon.

Akademias Studoj
Biblioteka Bulteno
Bulteno de Universala Ligo
Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj
Cirkulero de Akademio de Esperanto
Dialogo
Dia Regno
Eco-logos
El Popola Ĉinio
Esperanta Mormonaro
Esperantista Vegetarano
Esperanto
Esperanto Teacher
Espero Katolika
Eventoj
Filologo
Fonto
La Gazeto
Geolinguistics
Heroldo de Esperanto
Horizonto
Hungara Vivo
Itis-Forumo
Informilo por Interlingvistoj
Informilo pri la Instrua Laboro
Inter-Monato
Internacia Jura Revuo
Internacia Ĵurnalisto
Internacia Lingvo
Internacia Pedagogia Revuo
Jewish Language Review
Ju'i Lobypli (Lojban)
Journal of Planned Languages
Juna Amiko
La Kancerkliniko
Kontakto
Kooperativa Stelo
Kulturaj Kajeroj
Language Problems & Language Planning

Laŭtel
 La Letero de l' Akademio de Esperanto
 Literatura Foiro
 Literatura Skatolo
 Medicina Internacia Revuo
 Monato
 Monda Diskutilo
 Monda Karuselo
 Norda Prismo
 Oomoto
 Paco
 Periodaĵoj
 Planlingvistiko
 Preludo
 Sano
 Sciencaj Komunikaĵoj
 Scienco kaj Kulturo
 Sennacieca Revuo
 Sennaciulo
 Sferoj
 Spektro
 Survoje
 TEC-bulteno
 TEJO-tutmonde
 Le Travailleur Espérantiste
 Volapükabled/Volapuk-Studoj
 The Worker Esperantist/La Verda Proleto

Informoj pri mi estas inkluditaj en la utila konsultlibro *Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko?*.

Krom publikigo de originalaĵoj unue en periodaĵoj, pluraj verkoj aperis ankaŭ en la sekvaj antologioj:

1. *18-aj Internaciaj Floraj Ludoj*. Zaragoza: Hispana Esperanto Federacio; 1979
 Memoraĵoj el Pompejo (novelo)
2. *Interlingvistiko Esperantologio*. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio; 1985
 La deveno de la Esperanta sufikso -ul
 Etimologio de la sufikso -il
 La etimologio de la prepozicio „al”
 Ĝustigo de kelkaj mise transskribitaj loknomoj en Poŝatlaso de la Mondo
 La uzo de la prepozicioj „de” kaj „per” kun la pasiva participo
3. *Trezoro - La Esperanta novelarto. 1887-1986*. Budapeŝt: Hungara Esperanto Asocio; 1989
 Delogado per krajono (novelo)
 Tropika festeno (novelo)
 La lasta misio (novelo)
4. *Esperanto-Krestomatio por studentoj de filologiscienca fakultato*. Debrecen: Universitato Lajos Kossuth; 1989
 La moderna arkeologio; ĝiaj celoj kaj metodoj
5. *La Lingua Fantastica*. (antologio de originala Esperanta fantaziscienca literaturo tradukita en la italan). Aosta: Keltia Editrice; 1994
 L'esperimento censurato (La cenzurita eksperimento) (novelo)

Spazzatura spaziale (Kosma rubaĵo) (novelo)

6. *Tempo fuĝas. Dudek kvin rakontoj el Monato 1980-1994*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo; 1995

La nekonstruebla turo (novelo)

Miaj verkoj aperis ankaŭ en jenaj festlibroj.

1. *Lí kaj Ni. Festlibro por la 80a naskiĝtago de Gaston Waringhien*. Antverpeno/La Laguna: TK-Stafeto; 1985

Influo de Volapuko sur la ĝermanan komponanton de Esperanto

2. *Centjara Esperanto. Jubilea Libro de Akademianoj*. Chapecó-SC (Brazilo): Fonto; 1987

Terminologia kaoso: komputilo, komputero, komputoro

3. *Serta Gratvatoria in Honorem Juan Régulo*. II Esperantismo. La Laguna: Universidad de La Laguna; 1987

Principoj por la esperantigo de hispanlingvaj vortoj kaj propraj nomoj

Jam estis publikigitaj libroforme du miaj novelaroj, kaj du longaj noveloj estis eldonitaj kiel kajeroj.

1. *Hieraŭ - Hodiaŭ - Morgaŭ*. Antverpeno/La Laguna: TK Stafeto; 1982

2. *Bestoj kaj homoj*. Pizo: Edistudio; 1986 (1987)

3. *Infero en aŭtuno* (detektificia romaneto). Debreceno: Debrecena Bulteno; 1993
(La verko aperis ankaŭ felietone en *Survoje*, 1990-1992.)

4. *Ŝamanoj en la kosmo* (sciencfikcio). Triesto: Triesta Esperanto-Asocio; 1994

Du el miaj teatraĵoj, „Saluto al Paradizo” kaj „Pureco de sango”, estis surscenigitaj okaze de unu Universala Kongreso de Esperanto kaj pluraj renkontiĝoj de Esperanto-teatroj. Jam eldonita estas kolektaĵo da unuaktaj teatraĵoj: *Antaŭ la kulisoj*. Budapeŝto: Hungara Esperanto Asocio; 1994.

Polemika teksto rilate Esperantan leksikologion aperis en *Debato pri la „Praga Skolo”*, Kooperativo de Literatura Foiro, Svislando, 1989.

La eraraj tezoj de Eli Urbanova

Premiado

Pluraj miaj verkoj estis premilitaj en internaciaj belartaj konkursoj kaj ankaŭ en konkursoj de landaj asocioj kaj aliaj instancoj en Esperantujo. Mi iĝis laŭreato ofte en pli ol unu konkursperiodo.

Belartaj Konkursoj de UEA

1976: Premio Harabaĝiu (Nova Talento)

Tropika festeno (novelo)

1976: Daniel kaj la leonoj (Branĉo-fotografio)

1977: La lasta misio (novelo)

La profanado (novelo)

1978: Saluto al Paradizo (teatraĵo)

1979: Pureco de sango (teatraĵo)

La süahila lingvo kaj Esperanto - komparo kaj kontrasto (eseo)

1980: Tagiĝa ordalo (teatraĵo)

La lingvo de Doktoro Sopiranto (novelo)

1981: Vigla nokto en la haremo (novelo)

1982: Delogado per krajono (novelo)

Murdo laŭ romia maniero (teatraĵo)

- 1983: La mistero de la Verda Krokodilo (eseo)
- 1985: La komercisto (novelo)
- 1987: Leciono pri „ci” (teatraĵo)
- 1988: Piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj planlingvoj (eseo)
- Maja Voĉo - Jugoslavio
 - 1976: Malegala disdivido (novelo)
- Internacia Literatura Konkurso „Tridentum” - Italio
 - 1977: La sanktejo (novelo)
- Internaciaj Floraj Ludoj: (trifoja unua premio en la proza branĉo kun titolo de Majstro) - Katalunio
 - 1978: Memoraĵoj el Pompejo (novelo)
 - 1979: Fetiĉoj kaj fotoj (novelo)
 - 1980: Du virgulinoj sur la rando de infero (novelo)
- Literatura Konkurso de *Bulgara Esperantisto*
 - 1980: La novaj antikvaĵoj de s-ro Morales (novelo)
- Literatura Konkurso de Madrida Esperanto-Liceo
 - 1980: Bomba vojaĝo! (novelo)
- Fundación „Esperanto”-Hispanio
 - 1980: La origino de la morto (afrikaj popolrakontoj)
- Literatura Konkurso de Madrida Esperanto-Liceo
 - 1980: La malfidela reĝino (novelo)
- Literatura Konkurso de *Bulgara Esperantisto*
 - 1981: La tragedio de Cerven (novelo)
- Literatura Konkurso de *Koko* - Jugoslavio
 - 1989: La tro efika artifiko (teatraĵo)
- Internacia Literatura Konkurso „Ivan Krestanov” (du grandaj premioj) - Bulgario
 - 1990: La etna konsisto de Bjalistoko meze de la 19-a jc. (eseo)
 - Vidpunktoj pri verba transitiveco en Esperanto (eseo)
- Internacia Literatura konkurso „Atanas D. Atanasov” - Bulgario
 - 1992: La nomoj de la fingroj en Esperanto (eseo)
- Muzo - Litovio
 - 1995: La deveno de pano (popolrakonto el Volapuklando)
- Muzo -Litovio
 - 1996: El la faŭko de la verda infero (novelo)
- Rusia Literatura Konkurso - Ruslando
 - 1997: Pelmelo en bordelo (novelo)

En 1988 Hungara Esperanto Asocio honoris min per la memormedalo „Pro Esperanto” por altnivela literatura kaj interlingvistika agadoj.

Prelegoj kaj referaĵoj

Mi disvastigis miajn ideojn kaj sciojn ne nur verkante surpapere sed ankaŭ prezentante ilin en la formo de ilustritaj paroladoj ĉe konferencoj, sciencaj renkontiĝoj kaj kunvenoj de lokaj grupoj. La sekva listigo donas superrigardon de la tem-amplekso de miaj referaĵoj kaj la lokoj, kie okazis la prezentadoj.

Studenta Interlingvistika Seminario (SIS) - Varsovio

1977: Kompara analizo de du hispananglaj kompromisaj planlingvoj:
Frendo kaj Anglo-Lat

1978: La difina artikolo en la hungara lingvo kaj en Esperanto - kontribuaĵo al la „gramatiko de eraroj”

1979: Kelkaj trajtoj de la „hungara dialekto” de Esperanto

Vortformado en Volapuko kaj en Esperanto
 Analizo de la planlingvo *Medo*
 1980; Angladevenaj vortoj en la hungara dialekto de Esperanto

Scienca Interlingvistika Simpozio (SIS) - Varsovio
 1988; Eraraj tezoj pri la lingva evoluo kaj beletra praktiko

Dua Internacia Scienca Esperanto-Seminario pri Kosmaj Esploroj - Vraca, Bulgario
 1987; La esperantigo de eksterteraj nomoj
 La Esperanto-nomoj de la satelitoj de Jupitero
 Kiel instrui la marsan lingvon al teranoj

Dua Lingvistika Seminario, Lingvistika Komisiono de HEA, Departementa Komitato Győr-Sopron - Győr, Hungario
 1988; Angladevenaj vortoj en la hungara dialekto en Esperanto

Ĉekanara HEJ Trejn-seminario (Hungara Esperanto-Junularo) - Balatonalmádi, Hungario
 1994; Proverboj en Esperanto hodiaŭ kaj morgaŭ

Seminario pri Tradukado (TRASE) - Bučovice, Ĉeĥoslovakio
 1990; Misuzo de la adjektivo „specifa” en *Terminologia Vortaro*
 Kiel *ne* esperantigi anglalingvan tekston

Internacia Seminario, Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA) - Ahrenshoop, GDR
 1988; La leksikografia rolo de la Akademio de Esperanto

Seminario: Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko (SAEST) - Ŭsti n. Labem, Ĉeĥoslovakio
 1980; Kelkaj problemoj rilate la ellaboron de arkeologia fakterminologio en Esperanto

Landaj Esperantaj Pedagogiaj Tagaj (Hungara Esperanto-Asocio) - Budapeŝto
 1990; Komplika transitiveco en Esperanto kaj simpligita transitiveco en Ido
 1991; Varioj en la prononco de Esperanto
 1994; Kritikoj kaj komentoj pri la Supera Ekzameno de ILEI

I-a Internacia Interlingvistika Konferenco - Budapeŝto
 1978; Bibliografiaj donitaĵoj pri eblaj planlingvaj fontoj de Esperanto

Esperantologia Konferenco, 63-a Universala Kongreso de Esperanto - Varna, Bulgario
 1978; Kelkaj problemoj rilate la ellaboron de arkeologia fakterminologio en Esperanto

Struktura kaj Socilingvistika Esploro de Esperanto (konferenco) - Budapeŝto
 1988; Conservation of the heritage of Volapük
 Problemoj rilate la starigon de ortografiaj normoj en Esperanto

Celo kaj strategio de Esperanto-Movado (konferenco), Hungara Esperanto-Asocio - Budapeŝto

1990; Instruado kaj lernado en la Strategia Plano de UEA

Akademio de Esperanto: Kolokvo pri la stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto - Prago

1994; Esperanto kaj la defendo de minacataj minoritataj lingvoj

Linguistics symposium: Native-language influence on Esperanto, Division of Applied Linguistics, University of Illinois - Urbana-Champaign, Usono

1980; An analysis of some characteristics of Hungarian Esperanto

Modern Language Association: Special Session on Interlinguistics - Ĉikago

1977; The influence of Volapük on Esperanto as indicated by lexical data

Lingvistika kunsido, Hungara Esperanto Asocio - Veszprém, Hungario

1987; La bezono de etimologia vortaro de Esperanto

34-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) - Balatonfüred, Hungario

1982; La arkeologio de la regiono de Lago Balatono en Hungario

Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj (IUFEF), 68-a Universala Kongreso de Esperanto - Budapeŝto

1983; Pri kelkaj interlingvistikaj terminoj por lingvoj

17-a Somera Esperanto-Universitato - Gyula, Hungario

1979; Sur la spuroj de la prahomo en Hungario

Sciencaj Vesperoj, Grupo Konkordo - Budapeŝto

1975; La moderna arkeologio: ĝiaj celoj kaj metodoj

1977; La origino de la arto ĉe la prahomo

1979; La subakva arkeologio

1979; Sur la spuroj de la prahomo en Hungario

1980; La eksperimenta arkeologio

Verda Stelo Esperanto-Grupo - Győr, Hungario

1975; Problemoj de nuntempa Afriko

1975; Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado

1976; La lastaj tagoj de d-ro L.L.Zamenhof

1976; La popolrakonto en Afriko

1979; La subakva arkeologio

Eszperantó Klub - Veszprém, Hungario

1979; La subakva arkeologio

1981; Sur la spuroj de la prahomo en Hungario

1981; La origino kaj signifo de la prahistoria arto

Scienca Rondo de Esperantistaj Studentoj (SRES), Komisiono de HEA pri Scienca kaj Faka Aplikado de Esperanto, Hungara Esperanto Asocio - Budapeŝto

1979; La subakva arkeologio

Elita Rondo (ERo-kunveno), Esperanta PEN-Centro - Budapeŝto

1994; Kreado kaj uzado de originalaj proverboj en Esperanto

Merkurio (kunveno) - Roterdamo

1973; Vivanta Gazeto - Kio estas la plej granda problemo en la mondo hodiaŭ?

Radio-brodkastoj

Krom la ĉi-supraj prelegoj antaŭ videblaj ĉeestantaroj, mi utiligis ankaŭ la eteron kiel medion kaj faris paroladojn por aŭskultantoj de *Eszperantó Híradó* (Esperanto-Novaĵoj), la ĉiusemajnaj esperantlingvaj programoj de Hungara Radio. Ankaŭ mia filo Daniel Lariko kunlaboris, voĉlegante ĉe la mikrofono plurajn miajn novelojn.

Kiam la Esperanto-Redakcio de Pola Radio iniciatis la rubrikon „Esperanta banko de lingvoeraroj”, mi sendis raportojn kun ekzemploj de ofta subnorma lingvouzo en Esperantaj publikigaĵoj, kaj miaj kontribuaĵoj estis brodkastitaj en la elsendoj de Varsovio.

Estinteco, estanteco kaj estonteco

Retrospektive, estas malfacile al mi decidi, al kiu el la diversaj aspektoj de mia aktiveco pritraktita ĉi-supre, mi donu la plej grandan gravecon. Sendube mia plej persona kontribuo al la Esperanto-komunumo estas la fondo de esperantista familio. Kiam mi faris mian unuan vojaĝon al Hungario en 1970, mi renkontiĝis kun mia estonta edzino Eva okaze de Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj Naturamikoj (IREN), kaj sekvantaj ni geedziĝis: ja temis pri „edzperanto”. Sekvis la alveno de du denaskuloj, Daniel Lariko en 1974 kaj David Alko en 1977, kiuj elkreskis en familio, kie la ĉiutaga lingvo estis Esperanto. La hejman etoson karakterizis la tradiciaj homaranismaj kredoj kaj spirito, kiujn la knaboj akiris, por tiel diri, kun la patrina lakto.

Estas eble diri, ke mi tiel provizis per edukado du membrojn de la sekva generacio de esperantistoj, heredigante al ili kaj la lingvon kaj la ideologion de la interna ideo. Jam estas tempo, ke ili pluportu la torĉon. Mia edzino same kiel niaj filoj nuntempe agadas kiel aktivaj movadanoj, rolante en lokaj kaj landaj organizaĵoj, kie ili plenumas gravajn oficojn. Ili scias, kion ili volas kaj devas fari kaj kiumaniere ili povas atingi la celojn memstare, rekte kaj neflankiĝante.

S.A. 10
Eĉ nun, post kvaronjarcento da intensa intelekta laboro per, pri kaj por Esperanto, mi, tamen, neniel emas pasive ripozi sur miaj laŭroj. En ŝrankoj kaj sur bretoj de mia laborĉambro estas amasoj da plenŝtopitaj kovertoj kaj dosieroj enhavantaj notojn, klasifitajn sliparojn kaj malnetojn pri publikigindaj verkoj. Mi tute ne intencas lasi tiun materialon ŝimi en tirkestoj sed provos aperigi ĝin ie kaj tie en la Esperanta gazetaro same kiel mi faris en la pasinteco. Tamen, de tempo al tempo mi sentas preman fruston, ĉar mi ja bone scias, ke neniam en la vivo de unu sola homo, eĉ multe pli juna ol mi, estos eble elĉerpe ekspluati tiun trezorejon de ideoj, planoj kaj projektoj. Ĉiukaze mi provos fari kiel eble plej multon. *nun tempo por bremsi halti ripozi*

Konkludo

verko
En tiu ĉi propono por la premio FAME, mi prezentis bildon pri mia kultura alportado al la lingvo kaj socio de Esperantujo. Nun konvenas respondi la inversan demandon: „Kion Esperanto donis al mi?”. Tiun kontribuon mi povas resume esprimi per jenaj ses vortoj: „Ĝi faris mian vivon pli bona”.

Veszprém, la 20-an de aŭgusto, 1997

Bernard GOLDEN
Damjanich u. I/C. I.8.
HU-8200 Veszprém
Hungario